# Ĉu tipologiaj ŝanĝoj en Esperanto?

*Emanuele Miola*

In this paper, typological changes that took place, or are taking place, in Esperanto are discussed for the first time. Two varieties, namely, the one used by Esperanto's planner Ludwik Lejzer Zamenhof, and the other one used in modern and contemporary Esperantist magazines, are put in comparison. Three different case studies are discussed: the order of adjective and noun in the noun phrase; the order of verb and manner adverbs in the verb phrase; the usage of pre-nominal participial relative clauses vs the usage of the (post-nominal) relative pronoun strategy. The analysis is based on corpus-driven data, drawn from the existing literature on the topic and from corpus queries carried out by the author. Results show evidence of some changes in the typological shape of Esperanto. The reason behind these changes is also investigated; most notably, influences of English and speakers' mother tongues, as well as natural typological drift, cannot be called into question, as far as syntactic changes are concerned. On the other hand, it seems reasonable to think that changes involving morphology – at least to some extent – are due to the tendency of Esperanto speakers to reduce the number of words and of morphemes in their sentences, fully exploiting the agglutinative morphology of the language.

Keywords: Esperanto, typology, typological change.

## 1. Enkonduko[1]

Ekde la 1980aj jaroj, tre vigla debato leviĝis inter akademiuloj kaj esperantistoj pri la karakterizaĵoj de Esperanto, speciale observitaj el tipologia perspektivo. Tiaj verkoj kutime celas respondi la klasikan demandon ĉu Esperanto povas esti konsiderata simila (aŭ pli simila) al tiu aŭ alia aparta lingvo parolata en Okcidenta Eŭropo, Orienta Eŭropo, aŭ eĉ ekster Eŭropo, aŭ eble esti konsiderata 'neŭtrala kaj averaĝa lingvo'. Tamen, Esperanto, kiel ĉiu alia vivanta lingvo, estas 'en movado', t.e. novaj vortoj kaj konstruaĵoj (laŭ la senco de Goldberg 2003) estas kreitaj kaj uzataj de ĝia parolanta komunumo—

[1] Mi dankas al Federico Gobbo pro la diskuto de antaŭa versio de ĉi tiu kontribuaĵo kaj pro liaj sugestoj, kaj pro lia provlegado.

kvankam ne ĉiam akceptitaj de ĉiuj parolantoj, kaj ĉefe fare de de la Akademio de Esperanto.[2] Plue, lingvaj ŝanĝoj povas esti observataj ankaŭ en la uzado de certaj konstruaĵoj, kiuj, en multaj okazoj, estas atestitaj ekde la unuaj tekstoj Zamenhofaj: tiaj ŝanĝoj kelkfoje povas konduki al malsama tipologia formo de la lingvo. En tiu ĉi artikolo mi celas mallonge priparoli kelkajn tipologiajn ŝanĝojn, kiuj verŝajne okazas en Esperanto, kaj trakti ilin lingvo-specife (t.e. en la ekonomio de Esperanto mem) kaj interlingve (t.e. konsiderante aliajn lingvojn, speciale tiujn, kun kiuj Esperanto estas en kontakto). Post Sekcio 2, kie la konarstato kaj iuj bazaj tipologiaj konceptoj estas priskribitaj, la dokumento prezentas kelkajn kazesplorojn en Sekcio 3 kaj diskutas ilin en Sekcio 4 el tipologia perspektivo. Sekcio 4 ankaŭ enhavas kelkajn finajn rimarkojn.

## 2. Tipologio kaj Esperanto: superrigardo

Kiel tre bone konate, Esperanto estis planita de la oftalmologo kaj poligloto Ludoviko Lazaro Zamenhof por faciligi komunikadon inter homoj kun malsamaj gepatraj lingvoj. Zamenhof mem vivis en tre multlingva medio kaj povis paroli, aŭ almenaŭ havis iom da scio pri, la biblia hebrea, angla, franca, latina, la malnova greka, kaj la pola; krome, oni aldonu la rusan kaj la jidan, kiujn li lernis de siaj gepatroj (Korĵenkov 2011).

Esperanto estis lanĉita en 1887 kaj nuntempe estas konsiderata la sola plenvalora planita lingvo (Blanke 2001). Ĝi estis konstruita por esti tiel facile lernebla kiel eble por ĉiuj homoj ĉirkaŭ la mondo. Tamen, konsentite la tiel-nomata *diversitas linguarum*, t.e. lingvardiverseco, kiu montras kiom diversaj estas lingvaj strukturoj, la demando pri facileco de lernado de Esperanto restas ĝis nun sen certa respondo (Koutny 2015). Krome, lingvardiverseco ne estas senlima se oni rigardas la strukturojn de homaj lingvoj. Ekde la unuaj verkoj pri tipologio, kiuj povas esti sekvitaj almenaŭ ĝis la unua duono de la 19-a jarcento (Graffi 2010) kaj estis elpensitaj en ‘moderna’ tipologia esploro fare de Greenberg (1963), la ĉefa ambicio estis trovi limojn kaj trajtojn validajn por ĉiuj lingvoj. Konsiderante la morfologian strukturon de vortoj, ekzemple, ĉiuj lingvoj povas esti klasifikitaj en unu el nur kvar malsamaj ‘tipoj’ nomataj izolaj (aŭ analitikaj), aglutinaj, fuziaj (aŭ fleksiaj) kaj polisintezaj (aŭ kunigaj). Krome, tipologiaj esploroj monstras, ke, el la fonologia vidpunkto, ĉiuj lingvoj havas vokalojn kaj ĉiuj lingvoj havas konsonantojn. Asertoj kiel la lasta, kiu estas vera por ĉiuj lingvoj, estas nomataj absolutaj universalaĵoj. Simila aserto estas la jena: se lingvo havas nazalajn vokalojn, ĝi havas buŝajn vokalojn;

[2] Vidu la decidojn kaj rekomendojn publikigitajn ĉe https://www.akademio-de-esperanto.org/decidoj/index.html; por skizo de daŭraj ŝanĝoj vidu Fiedler and Brosch (2022: 335-349).

en tiaj asertoj la unua trajto aŭtomate implicas la lastan, kaj pro tio tiaj deklaroj estas nomataj implicaj universalaĵoj. Je sintaksa nivelo, implica universalaĵo estas: se la preferata vortordo en lingvo estas Subjekto (S), Objekto (O), Verbo (V) kaj ne ekzistas alternativa vortordo, aŭ nur OSV kiel alternativo, tiam ĉiuj adverbaj modifantoj de la verbo antaŭas la verbon.[3]

Kiel jam menciite, lingvoj povas aparteni al diversaj tipoj (de kie deriviĝas la termino 'tipologio'), rilate al la strukturaj trajtoj, kiujn ili montras. Interese, lingvoj, kiuj ne estas genealogie rilataj, povas esti tipologie identaj. Se oni konsideras la bazan vortordon de S, O kaj V, kaj la pozicion de la substantivo (N) rilate al siaj adjektivoj (Adj) kaj sia genitivo (G), la itala, la vjetnama kaj iuj bantuaj lingvoj apartenas al sama tipo, nome SVO, NAdj, NG; dum Latino (aŭ, por esti pli precize, la malnova latina) apartenas al alia tipo, SOV, NAdj, GN, kvankam ĝi estas la patrino de la itala, same kiel de la aliaj latinidaj lingvoj.

Malgraŭ la fakto, ke Esperanto estas planlingvo, ĝiaj trajtoj respektas ĉiujn universalojn kaj tial ĝi precize kondutas same, ankaŭ ĉi-rilate, al ajna natura, aŭ etna, lingvo. Unu el la celoj de la studoj dediĉitaj al la tipologio de Esperanto—krom priskribi ĝiajn strukturajn trajtojn—estis evidentigi ties similecon al specifa lingvo aŭ lingvofamilio. Tio, refoje, revenas en la disputo pri la neŭtraleco de Esperanto, aŭ neekzisto de tio, pro ties troa 'eŭropeco', kiu evidentiĝas almenaŭ en la leksiko.[4] Tamen, aliaj aspektoj de la lingvo ne konfirmas tiel altan nivelon de 'eŭropeco'.

En en la sekvaj alineoj, mi skizos superrigardon de la tipologio de Esperanto, celante apartigi la lingvojn, kiuj laŭ ĉiu domajn-trajto povus aparteni al sama kategorio. Por profundiĝi en aliaj priskriboj de la tipologio de Esperanto, vidu Koutny (2009, 2015), Pereltsvaig (2017: 170-174) kaj referencoj tie.

Laŭ la vidpunkto de la fonotipologio, surbaze de fonostatistikaj pruvoj, Tambovtsev (2008: 29-32) asertas, ke Esperanto estas pli proksima al la malnova greka kaj al la latinidaj lingvoj (precipe la itala).[5] Laŭ la morfologio, Esperanto estas ĉefe aglutina lingvo, ĉar ĉiu leksika signifo kaj koncepta aŭ gramatika kategorio estas ĝenerale esprimita per sia propra morfemo (t.e., la indekso de aglutineco de Esperanto proksimiĝas al 1). Plue, la tiel-nomata indekso de sintezeco (t.e., la averaĝa nombro de morfemoj entenitaj en vorto) estas ĉirkaŭ 2. Ekzemple, la Esperanta frazo *la vento movas la standardon* povas esti segmentita per la jenaj morfemoj:

---

[3] La nuntempa tipologia esplorado traktas universalaĵojn kiel tendencojn kiuj elmontras superforte pli grandan ol hazardan oftecon prefere ol kiel regulojn sen kontraŭekzemploj. Ĉi tiu temo tamen ne povas esti elklarigita ĉi tie.

[4] Latinidaj kaj ĝermanaj lingvoj provizas pli-malpli 80% de la Esperantaj vortoj kaj eĉ 70% de la kerna leksiko estas derivita de la latina (Gledhill 2000: 22). Tiu lasta valoro relative al Esperanto pli-malpli korespondas kun la averaĝaj valoroj de la plejmulto de la hind-eŭropaj lingvoj (Janton 1993: 51, vidu ankaŭ Parkvall 2010: 66).

[5] Kelkaj rimarkoj pri la Esperanta ortografio ankaŭ direblas: notinde, ĝi prezentas unu-al-unu korespondon inter grafemoj kaj fonemoj, kaj ĝia skribo estas modifo de la latina skribo, la plej vaste uzata alfabeto en la mondo.

(1) *la vento movas la standardon*

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| *la* | *vent-o* | *mov-as* | *la* | *standard-o-n* |
| ART | vent-N | movi-PRS | ART | standard-N-ACC |

La frazo (1) enhavas kvin vortojn kaj naŭ morfemojn, do la indekso de sintezeco estas 1.80, kaj ĉiu morfemo havas unu kaj nur unu signifon. En Esperanto polisemio (t.e. plursenceco) kaj multfunkcieco ĝenerale evitindas. Hind-eŭropaj lingvoj ne kutime apartenas al la tipo aglutina, tial tiurilate Esperanto tipologie pli proksimas al la ural-altajaj lingvoj. Tamen, pro la fakto, ke puraj tipoj estas malmultaj—eĉ agnoskite, ke ili entute ekzistas—iuj trajtoj de Esperanto povas simili al izolaj lingvoj, kiel ekzemple la ĉina. Menciindas la ekzisto de unusilabaj vortoj, kiel ekzemple la pronomoj *mi* kaj *ĝi*, kaj primitivaj adverboj (ekz. *nun*, *jam, ĉi*), kiuj estas uzataj en analitikaj konstruaĵoj anstataŭ en sintezaj. Estas ankaŭ aliaj trajtoj pli proksimaj al la sintezaj tipoj, kiel ekzemple la agordo inter adjektivo kaj substantivo por kazoj kaj nombro, aŭ la karesaj sufiksoj *-ĉj-* kaj *-nj-*, kiuj estas kapablaj krei alomorfan varianton de la morfemo, al kiu ili aldoniĝas (Piron 1977; Wells 1978: 30; Gledhill 2000: 41).

Kvankam la vortordo kaj semantiko de Esperanto ŝajnas esti pli simila al la hind-eŭropaj lingvoj (Koutny 2015: 59), rilate al la sintaksa tipologio, kiel diskutite en Sekcio 4, la norma Esperanto prezentas korelacian nekonsekvencon en siaj tipologiaj trajtoj.[6] Fine, ĝeneralaj esploroj, bazitaj sur la trajtoj inkluditaj en WALS, asertis ke la rusa estas la lingvo, kiu estas plej simila al Esperanto, dum la angla kaj la franca tuj sekvas (Parkvall 2010: 66). Parkvall (2010: 68) ankaŭ diras ke Esperanto "is slightly less like the average language, than, as it were, the average language is". Alivorte, tio signifas, ke Esperanto montras la plej oftan tipologian trajton en la 54% de la kazoj, dum la averaĝa lingvo en 55.4%. Koutny (2015: 59) aldonas ke "[e]ven if it is not a typical language from the statistical viewpoint it has characteristics which make it easily accessible internationally [because] underneath the Romance exterior lies a more general logical form which is also internationally accessible". Tamen, ne ĉiuj lingvoj estas egale traktitaj en WALS, kaj inter la malpli traktitaj, kun malpli ol kvin trajtoj konservitaj en la Atlo, estas la jida, unu el la hejmaj lingvoj de Zamenhof. Laŭ Pennacchietti (1982, 1987), la ekstreme libera sintakso kaj rigora konkreteco de Esperanto estas pro jida substrato, kiu kombinas la baltoslavajn kaj germanajn modelojn (parte videbla ekzemple en la klara difino de vortklasoj, en la kunmetitaj vortoj, verba morfologio, helpverba uzo, adjektiva morfologio kaj en la paradigmo de la

[6] Por norma Esperanto mi intencas ĉi tie la skriban kaj formalan varion uzatan ekde la lanĉo de Esperanto ĝis niaj tagoj. Ĉi tiu vario restis sufiĉe konsekvenca tra la jardekoj, kvankam kiel ni vidos, etaj ŝanĝoj povas esti observitaj.

personaj pronomoj). Tial leviĝas la demando pri kiu(j) lingvo(j) estas la fonto de la ŝanĝoj en la tipologia formo de Esperanto, se ekzistas tiaj.

## 3. Tipologiaj ŝanĝoj en Esperanta sintakso: tri kazesploroj

Unue, oni devas konscii, ke ĉiu vivanta lingvo spertas lingvajn ŝanĝojn: kiam la distribuo de la variantoj en la parolantara uzado ŝanĝiĝas, tiam okazas ŝanĝo. Esperanto ne esceptas tiurilate, kvankam kelkaj lingvistoj diskutas, ĉu ĝi havas geografiajn, stilajn aŭ sociajn variojn, aŭ ĉu ĝi estas kapabla evolui. La persisteco de tiu diskuto povus iom klarigi kial lingva ŝanĝo en Esperanto ĝis nun estis preskaŭ ne studita (Fiedler and Brosch 2022: 326), se oni flankenmetas rimarkindajn esceptojn kiel tiujn de Blanke (2010) kaj Philippe (1991). Laŭ la scio de la verkanto, tamen, eĉ malpli da vortoj estis dediĉitaj al ŝanĝoj rilataj al la tipologio de Esperanto. En tiu ĉi sekcio, mi esploros tiun kampon unuafoje.

La kazesploroj, kiujn mi traktos, estas: (i) la pozicio de adjektivaj modifiloj rilate al la substantivoj en la substantiva sintagmo; (ii) la pozicio de adverboj de maniero rilate al la verboj en la verba sintagmo; kaj (iii) la uzado de participaj korelativaj frazoj kontraŭ la uzado de la strategio kun korelativaj pronomoj.

En la sekvonta teksto mi komparos la konduton de du malsamaj tempaj etapoj de la norma Esperanto, nome la Zamenhofa Esperanto (ekde nun ZE) kaj la vario skribita en la nuntempaj esperantlingvaj ĵurnaloj (por kiu mi uzas la mallongigon NE).[7] La komparo baziĝas sur datumoj el ekzistanta perkorpusa fakliteraturo. Kiel kontrola korpuso mi uzis la *VISL Corpuseye Esperanto* korpuson (ekde nun: *Corpuseye*, http://corp.hum.sdu.dk/cqp.eo.html). Precipe, la korpuso de Gledhill (2000) enhavas 156 tekstojn de diversaj registroj kaj stiloj, kaj ĝia grandeco estas de 1563500 vortoj. Jansen (2007; 2008) uzas la *Unuan Libron* kaj la *Fundamenton de Esperanto* por prezenti la ZE (entute: ĉirkaŭ 9000 vortoj), dum lia kunteksta (skribita) NE-subkorpuso konsistas el artikoloj el la revuoj *Esperanto* kaj *Monato* (entute: ĉirkaŭ 280000 vortoj; por kvantaj esploroj estas uzata subkorpuso de 150000 vortoj). *Corpuseye* estas pli granda ol la antaŭaj korpusoj, enhavante ĉirkaŭ 1.5 milionojn da vortoj de la ZE, kaj subkorporo de Monato de ĉirkaŭ 1.3 milionoj da vortoj.[8] La diskuto pri la observitaj tendencoj en la sekvaj subsekcioj estos daŭrigita en Sekcio 4.

[7] Iu mencio pri la diakronio de Esperanto el lingva kaj traduka perspektivo troviĝas en Astori (2016) kaj en Gobbo & Astori (2021).

[8] La elekton de tiu korpuso por ĉi tiu pilota studo ŝuldas la antaŭpretigita sintaksa parsado de kelkaj partoj. Ekzistas aliaj Esperantaj korpusoj, ekz. tekstaro.com.

### 3.1. Ordo de adjektivo kaj substantivo

Kvankam teorie en Esperanto la adjektivoj povas antaŭiri aŭ postiri substantivon en la substantiva sintagmo (vidu 2 kaj 3),[9] "[a]djective placement is usually prior to the noun" (Gledhill 2000: 101).

(2) *Por **amiko intima** ne ekzistas vojo malproksima* (Zamenhof, *Proverbaro Esperanta*, 1910)

| | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|
| *Por* | *amik-o* | *intim-a* | *ne* | *ekzist-as* | *voj-o* | *mal-proksim-a* |
| por | amik-N | intim-ADJ | NEG | eksisti-PRS | voj-N | NEG-proksim-ADJ |

(3) *Mi neniam estis **intima amiko** de sinjoro Heathfield* (Zamenhof, *La batalo de l'vivo*, 1891)

| | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| *Mi* | *neniam* | *est-is* | *intim-a* | *amik-o* | *de* | *sinjor-o* | *Heathfield* |
| PRO.1SG | neniam | esti-PST | intim-ADJ | amik-N | de | sinjor-N | H. |

Tiu ĉi ordo ŝajne validas por ambaŭ ZE kaj moderna Esperanto, kiel oni povas konstati el Tabelo 1 sube (aldonendis kolono montranta la okazojn kaj la procentojn de la sekvenco Adj+N+Adj, en tiaj kazo kiel *troa petolo danĝera*):[10]

| | AdjN | NAdj | AdjNAdj |
|---|---|---|---|
| ZE | 36359 = 93.6% | 2340 = 6% | 121 = 0.3% |
| NE | 3241 = 96.4% | 87 = 2.6% | 35 = 1.0% |

*Tabelo 1.* Distribuo de {Adj, N} en la ZEa subkorpuso de *Corpuseye* kaj la NEa de Jansen (2007)

La diferenco estas statistike signifoplena.[11] Tiu ĉi diferenco daŭre ekzistas se oni konsideras la datumojn de ZE de Jansen (2008: 25) (359 = 88% AdjN kontraŭ 47 = 12% NAdj). Krome, modernaj datumoj similas al tiuj trovitaj de Gledhill (2000: 101) por Esperanto ĝenerale (97.12% AdjN kontraŭ 2.88% NAdj).

[9] Numeraloj kaj demonstrativoj ĉiam antaŭas la substantivon en Esperanto. Mi ne konsideros ilin en ĉi tiu subsekcio.

[10] Permana kontrolo de AdjNAdj-okazoj tra la aŭtomata serĉo de *Corpuseye* montras, ke ili eble estos supertaksitaj. Tamen, ĉi tio finfine ne damaĝas la argumentojn elmontritajn en ĉi tiu subsekcio.

[11] $X^2$ (2, N = 42183) = 110.5901, p < 0.00001.

Kvankam en Esperanto la ordo AdjN estis laŭplane libere interŝanĝebla kun NAdj en la substantiva sintagmo,[12] ekzistas tendenco al fiksigo de la unua ordo, kiu estis jam la preferata en ZE.

### 3.2. Ordo de adverbo kaj verbo

Por studi la pozicion de la adverboj de maniero rilate al la verbo en la verba sintagmo, mi ĉefe baziĝos sur la verkoj de Jansen (2007; 2008). Ankaŭ en tiu ĉi kazo, Zamenhof ne donis klare esprimitan regulon pri la antaŭa aŭ posta pozicio de adverboj. Do ambaŭ (4) kaj (5) aperas en ZE:

(4) *Tial ni diras: [...] "li **kantas bone**"* (Zamenhof, *Lingvaj Respondoj, 1889*-1913)

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| *Ti-al* | *ni* | *dir-as:* | *"li* | *kant-as* | *bon-e"* |
| DEM-CAUS | PRO.1PL | dir-PRS | PRO.3M.SG | kanti-PRS | bon-ADV |

(5) *ekzemple: patro* **bone kantas** (Zamenhof, *Pri Reformoj en Esperanto,* 1894)

| | | | |
|---|---|---|---|
| *ekzempl-e:* | *patr-o* | *bon-e* | *kant-as* |
| ekzempl-ADV | patr-N | bon-ADV | kanti-PRS |

La datumoj de Jansen (2007: 107ss.; 2008: 26-27) montras, ke la respektiva ordigo de Adv kaj V en ZE estas libera: duono de la okazaĵoj de adverbo estas antaŭ la verbo, duono estas post la verbo. Aliflanke, en la nuna Esperanto, la prefero por AdvV estas klara. Aktualaj okazaĵoj kaj procentoj por AdvV kaj VAdv estas prezentitaj en Tabelo 2:

| | AdvV | VAdv |
|---|---|---|
| ZE | 61 = 50% | 61 = 50% |
| NE | 844 = 79% | 224=21% |

*Tabelo 2.* Distribuo de {Adv, V} en ZEa kaj NEa subkorpusoj de Jansen (2007)

La menciita diferenco estas statistike signifoplena.[13] Kontrolserĉo tra ZE per *Corpuseye* liveris la sekvajn datumojn: 18709 da AdvV; 16030 da VAdv (*ne*, *do*, *kie*, *pli*, *tiel* kaj *kiel*, ĉiuj kun etikedo adverba en *Corpuseye*, estas ekskluditaj el la nombroj; procentoj: 53.9% AdvV vs 46.1% VAdv). La pritema tendenco

[12] NAdj povas esti preferata kiam la adjektivo havas predikativan, apozitivan aŭ emfazan funkcion, en propraj nomoj kaj titoloj, kiam la adjektivo estas uzata por specifi la jaron de dato, kaj kun substantivigitaj kvantigiloj (Gledhill 2000: 101; Jansen 2008: 25-26), same kiel en fiksitaj sintagmoj, kiel *lingvo internacia* (Gobbo 2016).

[13] $X^2$ (1, N = 1190) = 50.6484, p = < 0.00001.

do estas konfirmita: la diferenco inter la datumoj de Jansen kaj *Corpuseye* rilate al ZE ne estas signifa je $p < .05$,[14] sed tiu inter la ZE laŭ *Corpuseye* kaj la Jansena NE estas statistike signifoplena.[15]

Do, kiel montrite, evidentiĝas tipologia ŝanĝo en la nuna Esperanto, nome la fiksigo de la ordo AdvV en verba sintagmo.[16]

### 3.3. Ordo de substantivo kaj korelativa frazo

Por studi la eblan tipologian ŝanĝon en la ordo de substantivo kaj korelativa frazo (KF, *relative clause*) de Esperanto, oni bezonas skizon de la strategio, kiun la lingvo uzas. Kutime, Esperanto estas priskribata kiel lingvo, kie KFoj estas kodigitaj per la tiel-nomata "relative pronoun strategy" (Comrie 1989: 147-153). La karakterizaĵoj de tiu strategio estas "(i) that the relative clause contains a pronoun referring back to the head noun, (ii) that this pronoun is moved to the front of the relative clause, and (iii) that this pronoun is case marked" (Comrie 1996: 40). Tio estas precize tio, kion oni vidas en (6), prilaborite laŭ Comrie (1996: 41):

(6) *la letero,* ***kiun mi skribis***

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| *la* | *leter-o,* | *kiu-n* | *mi* | *skrib-is* |
| ART | leter-N | REL-ACC | PRO.1SG | skribi-PST |

*Kiun* referencas al la antaŭa *letero*, la tiel-nomata ĉefsubstantivo, kaj estas markita kiel akuzativo, ĉar ĝi estas la rekta objekto en la KFoj. Rimarku ankaŭ, ke *kiun* antaŭmoviĝas en sia gastiga frazo, ĉar kutime rektaj objektoj sekvas la verbon. La strategio de korelativaj pronomoj estas vasta en Eŭropo, sed ne estas ekster tiu kontinento, tiom, ke Comrie (1996) rimarkas, ke la uzata strategio de Esperanto-parolantoj estas frapanta ekzemplo de ties eŭropismo.[17]

Tamen, Esperanto povas ankaŭ uzi participojn en konstruoj, kiuj estas "functionally equivalent to 'full' relative clauses" (Gledhill 2000: 93). Kiel en multaj aliaj lingvoj (Shagal 2019), aktivaj kaj pasivaj participoj povas esti uzataj por rilatigi, respektive, la aktivaj kaj pasivaj subjektoj de la KFoj – pozicioj sube en la hierarkio de KFoj en Esperanto povas esti enkodigitaj nur per la strategio de rilataj korelativaj

[14] $X^2$ (1, N = 34861) = 0.7273, p = 0.393756.

[15] $X^2$ (1, N = 35807) = 264.8258, p = < 0.00001.

[16] La postvorta poziciigo de la adverboj estas ofta kiam ili estas iel emfazita.

[17] Rimarku tamen, ke antaŭ la korelativa pronomo ĉiam aperas komo skriboforme; tio estas ja malofta, almenaŭ en latinidaj lingvoj, por ne-restriktaj KFoj.

pronomoj. La participo kongruas en kazo kaj nombro kun la ĉefsubstantivo en la superordinata frazo.[18] Ekzemplo estas en (7):

(7) *La libristo premis la* ***al li etenditan*** *manon* (Zamenhof, *Marta*, 1910)

| | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|
| *La* | *librist-o* | *prem-is* | *la* | *al.* | *li* | *etend-i-t-a-n* |
| ART | librist-N | premi-PST | ART | al | PRO.3MS | etend-PST-PASS.PTCP-ADJ-ACC |
| *man-o-n* | | | | | | |
| man-N-ACC | | | | | | |

Konsideru, ke en (7) la konstruo donas sinsekvencon, kiu aperas tre rare en Esperanto krom participaj KFoj, nome la antaŭpozicio de la difinita artikolo *la* antaŭ rolvorteto (en tiu ĉi kazo *al*). Tiuj KFoj konservas la trioblan tempodistingon, kiu eblas montri per finitaj frazoj, dum la aganto povas esti esprimita per la rolvorteto *de*, kiu estas ofte uzata en Esperanto por agantoj aperantaj en pasiva frazo. Plue, participiaj KFoj en Esperanto povas esti poziciigitaj antaŭ- (vidu la supra ekzemplo 7) aŭ postsubstantive (8):

(8) *Ĉiuj rigardis sin reciproke per vizaĝoj* ***ŝvelintaj de la pikado*** (Zamenhof, *Fabeloj de Andersen 1*, 1909)

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| *Ĉiu-j* | *rigard-is* | *si-n* | *reciprok-e* | *per* | *vizaĝ-o-j* |
| ĉiu-PL | rigard-PST | REFL-ACC | reciprok-ADV | per | vizaĝ-N-PL |
| *ŝvel-i-nt-a-j* | *de* | *la* | *pik-ad-o* | | |
| ŝvel-PST-ACT.PTCP-ADJ-PL | de | ART | pik-PROL-N | | |

Koutny (2015: 49) asertas, ke uzi participon kiel KFon “makes it possible to place it [t.e., la KFon] before the noun, but is considered awkward”. Tamen, en analizo de la ŝanĝoj okazantaj en Esperanto bazita sur korpuso (Herring 2005) estis pruvita, ke la lingvo malemas uzi komplikitan korelativan formon, dum prefero iras al uzo de antaŭsubstantivaj (“Japanese-style”, t.e., japanstile, laŭ Herring) participaj KFoj: “specifically, rich, morphologically inflected relative pronouns are no longer needed”. La aserto de Herring (2005) estis subtenita per analizo de tri, iom malgrandaj subkorpusoj el Esperantaj revuoj: *Literatura Mondo* (1922-1923, 47611 vortoj), *La Nica Literatura Revuo* (1955-56, 35968 vortoj) kaj *La Fasko* (2000-2001, 24554 vortoj), kvankam li ne proponas precizajn datumojn pri tio.

[18] Sekve, foje eble ne estas facile distingi disde participon enkodigantan KFon kaj participon kiu rolas kiel verba komplemento.


La trovoj ŝajnas iom similaj se oni ĵetas rigardon al pli granda korpuso de datumoj: se oni komparas la ZE kun la NE en *Corpuseye*, la nombro de antaŭsubstantivaj participaj KFoj fakte plinombriĝas nur se oni alkalkulas frazojn, kiuj ankaŭ enhavas komplementojn aldonitajn al la participa verba formo, kiel ekzemple *far Centra Komitato* en (9). En ZE estas trovitaj 43 tiaj frazoj kontraŭ 120 en NE.[19]

(9) *la* ***akceptitajn far Centra Komitato*** *rimedojn (Monato)*

| | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|
| *la* | *akcept-i-t-a-j-n* | *far* | *Centr-a* | *Komitat-o* | *rimed-o-j-n* |
| ART | akcept-PST-PASS.PTCP-ADJ-PL-ACC | far | centr-ADJ | komitat-N | rimed-N-PL-ACC |

La okazoj de participoj, kiuj aperas post la artikolo *la* kaj antaŭ la substantivo, kaj do eble kaŭzas la participajn KFojn,[20] estas pli-malpli konstanta en ZE kaj NE (respektive, 0.88 kaj 1.2 je 1000 vortoj; nenormaligita entuto 1327 kontraŭ 1570).

Tamen, la strategio de participaj KFoj estas ĉiuokaze multe malpli ofta ol la strategio de pronomaj KFoj en ambaŭ subkorpusoj, kvankam – denove komparante la ZE kaj la NE de *Corpuseye* – la tuta nombro de *kiu* kaj *kiuj* (7.6 kontraŭ 6.4 je 1000 vortoj; en totalo 11403 kontraŭ 8426) kaj de *kiun* kaj *kiujn* (2.1 kontraŭ 1.1 je 1000 vortoj; en totalo 3209 kontraŭ 1508) signife malplinombriĝas.[21]




*Tabelo 3.* Normaligitaj valoroj (je 1000 vortoj) de la okazoj de la konstruaĵoj [*la*+PTCP+N] kaj de la pronomoj *kiu(j)* kaj *kiu(j)n* en ZEa kaj NEa subkorpusoj de *Corpuseye*

[19] La rezultoj de la korpusaj traserĉoj estis mane reviziitaj kaj la okazoj de substantivaj participoj, arofrazoj kun [participoj+substantivoj] kaj participoj kunordigitaj kun aliaj adjektivoj estis forigitaj: tiuj lastaj pritaksendas kiel simplaj adjektivoj kaj ne kiel verboj.

[20] T.e., la rezultoj redonitaj de la serĉo [word="la"] [pos="V" & morph="(?:(?:.* )?PCP AKT(?: .*)?)|(?:(?:.* )?PCP PAS(?: .*)?)"] [pos="(?:N)|(?:PROP)"] en en ZEa kaj NEa subkorpusoj de *Corpuseye*.

[21] Krome, ne estas malutile rimarki ĉi-rilate, ke antaŭsubstantivaj participaj KFoj evitas la enkonstruadon kaj rezultas kogne pli facile prilaboreblaj.

Resume, malgraŭ la fakto, ke la nombro de participaj antaŭsubstantivaj KFoj ne dubinde plinombriĝas, la aserto, ke ili anstataŭas postsubstantivajn KFojn per finitaj verboj, ŝajnas iom troiga. Tamen, eblas, ke tipologia ŝanĝo okazos en ĉi tiu gramatika domajno.

## 4. Diskuto kaj konkludo

Rilate al la tri tipologiaj domajnoj priskribitaj en Sekcio 3, almenaŭ iom da tipologia ŝanĝo jam okazis aŭ estas nun okazanta en Esperanto. Tio konfirmas la fakton, ke Esperanto estas vivanta kaj ŝanĝiĝanta lingvo, farita el malsamaj varioj laŭ sociolingvistikaj (ĉe ĉiuj variaj dimensioj) kaj tipologiaj vidpunktoj. Tion oni intencis montri konsiderante du malsamajn diakronajn etapojn de la norma Esperanto, nome la Zamenhofa kontraŭ la Nuna Esperanto. La tipologia diferenco inter varioj apartenantaj al la sama lingvo certe ne devas surprizi la leganton, ĉar ĝi estas esprimo de tiu 'vertikala diverseco', kiu estas nun en la centro de tipologiaj lingvistikaj studoj (vidu ekzemple Grandi 2020).

Kelkaj interesaj konsideroj, bazitaj sur la tri kazesploroj ĵus proponitaj, meritas atenton, aparte pri la temo de la faktoroj kiuj inspiris aŭ movas la tipologian ŝanĝon en Esperanto. Supozante, laŭ la ekzistanta literaturo, ke ĝiaj ŝanĝoj kaj reflektoj havas ja eksterajn kaj internajn kaŭzojn, oni povus alvoki, hipotezcele, (i) la influon de la angla kiel fakte tutmonda lingvo; (ii) la influon kiun la denaskaj lingvoj de la parolantoj havas sur la planita lingvo mem; (iii) tipologiajn tendencojn tipajn de la tiel-nomata *drift* ('drivado') al sintaksa konsistenco, laŭ la kutima uzo inter rondoj de lingvotipologoj (vidu Sapir 1921, Lehmann 1978).

Pri (i), kvankam ofte estas dirite ke Esperanto, kiam ĝi estas tuŝita de ŝanĝo, povus "massively borrow from English, possibly more than other languages because of its smaller initial stock" (Van Parijs 2011: 43), la antaŭaj paragrafoj montras, ke tio ne ĉiam estas la kazo rilate al la observitaj ŝanĝoj: nur en la kazo de fiksado de la AdjN-ordo oni povas alvoki la influon de la angla, sed en tiu lingvo adverboj de maniero estas metitaj postverbe kaj antaŭsubstantivaj participaj KFoj ne povas esti anstataŭigitaj per plenaj KFoj (Sleeman 2017) kaj ne povas akcepti komplementojn: tio estas, prefere, tipa trajto de la germana.

Simile, estas malfacile difini la gravecon de la denaskaj lingvoj de la parolantoj kaj skribantoj kiel ŝanĝipovaj faktoroj: la daŭrantaj ŝanĝoj rimarkitaj en la revuo *Monato* ne kongruas kun tio kion oni atendus de okcident-eŭropaj skribantoj. Ekzemple, la tendenco lokigi la adverbojn de maniero antaŭ la verbo (tendenco kiu fakte emerĝis kaj fiksiĝis nur post Zamenhof, kiel ni vidis) estas "[p]erhaps the most deep-seated Slavonic feature in the syntax of Esperanto" (Lindstedt 2009: 12), sed malfacilas solide pruvi, ke parolantoj de tiuj lingvoj amplekse influis post-Zamenhofan Esperanton.

Fine, por esplori la trian proponitan hipotezon, la pridiskutitaj kazesploroj montras, ke la strukturoj de Esperanto ŝanĝiĝas malkonsekvence al la antaŭatendoj pri lingvo kun elementordo VO en aserta frazo.[22] La priesploritaj kazoj fakte montras, ke Esperanto moviĝas al tipologiaj modeloj, kiuj estas pli kutimaj laŭ OV-lingvo. adverboj de maniero ĉiam antaŭas la verbon, dum ZE estis pli libera rilate al tiu ĉi vortorda aspekto. Krom tio, adverboj tipologie emas aperi, rilate al la verbo, en la sama pozicio de la objektoj, kiel montris ekzemple Dryer (1988: 107) per elektita grupo de 142 lingvoj (AdvV&OV kaj VAdv&VO aperas en 63 kaj 61 lingvoj respektive, dum nur 11 lingvoj apartenas al la tipo AdvV&VO – tiu de Esperanto – kaj nur 7 al la tipo VAdv&OV). En NE, KFoj ŝajnas aperi antaŭ la substantivo kiun ili modifas iom pli ol en ZE, kaj, malgraŭ ĝi ne nepre rilatas al VO/OV-ordo, AdjN-ordo nun fiksiĝis en la substantiva frazo. Tial, dum etnaj lingvoj kutime tendencas ŝanĝiĝi de OV- al VO-vortordo (Vennemann 1974, Givón 1979), la tipologia drivado de Esperanto ŝajnas ilustri bildon inversan, ĉar ĝi moviĝas al konsekventa kapfina lingvotipologio. *Mutatis mutandis*, variigite variendaĵoj, la tipologia skizo de Esperanto (t.e., SVO, AdjN, AdvV, NRel sed kun RelN iomete pliiĝanta) priskribita per tiu ĉi artikolo—kaj la rilata literaturo subtena al tio—fine aperigas Esperanton tipologie simila al tiu de la finna lingvo, kiu ankaŭ estas aglutina lingvo (krom eble la pozicio de adverboj rilate al la verboj: tiu ĉi ordo estas pli loza en la finna, kaj VAdv estas preferata, Haarman 2008). Tamen, ĉar ĉi tiu estas nur pilota studo, evidente estus oportune konfirmi aŭ refuti la trovojn ĵus priskribitan kun pli da datumoj kaj korpusoj, kaj pli profunde esploru la eblajn kognajn kialojn de la priskribitaj ŝanĝoj.

Efektive, dum estas malpli facile identigi la kaŭzon de la ŝanĝoj de la sintaksaj ordoj diskutitaj en Sekcio 3.1 kaj 3.2, kiam oni observas trajtojn, kiuj ankaŭ implikas morfologiajn ŝanĝojn, kiel en Sekcio 3.3, aŭ temas plene morfologiajn ŝanĝojn, la ripeta modelo ŝajnas esti tiu de la redukto de vortoj kaj morfemoj por plene uzi la aglutinan morfologian karakterizaĵon de Esperanto. Ekzemploj subtenaj al tiu ĉi tezo estas: la forlasado de la progresiva formo [estas + participo] en favore de [formo de la participo + verba finaĵo] (Herring 2005), kiel en *ŝi estas skribanta leteron* kontraŭ *ŝi skribantas leteron*, aŭ la emerĝo de la *iĝ*-formoj por pasivoj anstataŭe de [esti + pasiva participo] (*la kuko estis manĝita* kontraŭ *la kuko manĝiĝis*).

Tiaj preferoj kaj ŝanĝoj, per kiuj Esperanto montras trajtojn similajn al germanaj, slavonaj kaj ugrofinaj lingvoj, aŭ al pli ekzotikaj lingvoj por parolantoj de la latinindaj lingvoj, ŝajnas subteni la aserton de Pennacchietti (1987: 139), kiu, pro sia aglutina morfologia, kadre de tipika mezeŭropa strukturo priskribis Esperanton kiel "la meno indo-europea delle lingue culturalmente occidentali".

[22] La korpusaj esploroj de Jensen (2007; 2008) montras, ke la ĉefa vortordo en Esperanto estas, sendube, SVO, kaj neniu ŝanĝo estas okazanta ĉi-rilate.

## Listo de mallongigoj

| | |
|---|---|
| 1 | 1a persono |
| 3 | 3a persono |
| ACT | aktiva voĉo |
| ADJ | adjektivo |
| ADV | adverbo |
| ART | difina artikolo |
| CAUS | kaŭzo |
| DEM | demonstra elemento |
| M | vira elemento |
| N | substantivo |
| NEG | negacio |
| PASS | pasiva voĉo |
| PRO | pronomo |
| PROL | daŭra ago |
| PRS | nuntempo |
| PST | pasinta tempo |
| PTCP | participo |
| REFL | refleksivo |
| REL | korelativa pronomo |
| SG | singularo |

## Bibliografio


Astori, Davide. 2016. “Le traduzioni di ‘Pinocchio’: come si è evoluto l’esperanto tra il 1930 e il 2003.” In: *Lingua, politica, cultura: Serta gratulatoria in honorem Renato Corsetti*, edited by Federico Gobbo, 150-161. New York: Mondial.

Blanke, Detlev. 2001. “Vom Entwurf zur Sprache.” *Journal of Applied Linguistics* 15/1: 37-89.

Blanke, Detlev. 2010. “Sprachwandel im Esperanto – gezeigt an Beispielen aus der Lexik.” In: *Sprache als Spiegel der Gesellschaft. Festschrift für Johannes Klare zum 80. Geburtstag*, edited by Kristin Reinke and Carsten Sinner, 51-77. München: Peniope.

Comrie, Bernard. 1989. “Rethinking the typology of relative clauses.” *Language Design* 1: 59-86.

Comrie, Bernard. 1996. “Natural and Artificial International Languages: a Typologist’s Assessment.” *Journal of Universal Language* 3: 35-55.

Dryer, Matthew S. 2007. "Word Order." In *Clause Structure*, edited by Timothy Shopen, I: 61-131. Cambridge: Cambridge University Press.

Fiedler, Sabine & Brosch, Cyril Robert. 2022. *Esperanto – Lingua Franca and Language Community*. Amsterdam/Philadelphia: Benjamins.

Givón, Talmy. 1979. *On Understanding Grammar*. New York: Academic Press.

Gledhill, Christopher. 2000. *The Grammar of Esperanto. A Corpus-Based Description*. München: Lincom Europa.

Goldberg, Adele. 2003. "Constructions: a new theoretical approach to language." *Trends in Cognitive Linguistics* 7/5: 219-224.

Gobbo, Federico. 2016. "'Lingvo Internacia' aŭ 'internacia lingvo'? Kelkaj konsideroj pri la origina nomo de Esperanto en diakrona perspektivo." In: *Prilingve En Nitro: Politike, Historie, Teorie, Instrue*, edited by Stanislav Košecký, 149-158. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.

Gobbo, Federico kaj Astori, Davide. 2021. "Traduzione e diacronia in esperanto: Dante e Pinocchio." In: *Traduttologia e Traduzioni*, edited by Joanna Ciesielka, II: 131-140. Łódź: WUŁ. https://doi.org/10.18778/8220-676-0.12

Graffi, Giorgio. 2010. "The Pioneers of Linguistic Typology: From Gabelentz to Greenberg." In: *The Oxford Handbook of Linguistic Typology*, edited by Jae Jung Song, 25-42. Oxford: Oxford University Press.

Grandi, Nicola. 2020. "La diversità inevitabile." *Italiano LinguaDue* 12/1: 416-429.

Greenberg, Joseph H. 1963. Some universals of grammar with particular reference to the order of meaningful elements. In: *Universals of Language*, edited by Joseph H. Greenberg, 40-70. Cambridge, MA: MIT Press.

Haarman, Harald. 2008. "Finnish." In: *Variationstypologie/Variation Typology*, edited by Thorsten Roelcke, 866-904. Berlin/New York: De Gruyter.

Herring, Joshua. 2005. "Syntactic and Lexical Changes in Esperanto: A Quantitative and Corpus-Based Survey." Available at: http://cllt.osu.edu/mclc/paper/syntactic_herrring.pdf [last accessed: 18 February 2016].

Jansen, Wim. 2007. *Woordvolgorde in het Esperanto. Normen, taalgebruik en universalia*. Utrecht: LOT.

Jansen, Wim. 2008. *Naturaj vortordoj en Esperanto*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.

Janton, Pierre. 1993. *Esperanto. Language, Literature, and Community*. Albany, NY: State University of New York Press.

Korĵenkov, Aleksander. 2011. *Homarano - La vivo, verkoj kaj ideoj de d-ro L. L. Zamenhof*. Kaliningrad: Sezonoj.

Koutny, Ilona. 2009. "Esperanto im Rahmen der Sprachtypologie." In: *Esperanto und andere Sprachen im Vergleich.* Beiträge der 18. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 21.-23. November 2008, in Berlin, edited by Sabine Fiedler, 117-130. Berlin: GIL. Available at http://www.interlinguistik-gil.de/wb/media/beihefte/16/beiheft16-koutny.pdf [last accessed: 31 March 2023].

Koutny, Ilona. 2015. "A typological description of Esperanto as a natural language." *Język. Komunikacja. Informacja. Language. Communication. Information* 10: 43-62.

Lehmann, Winfred P., ed. 1978. *Syntactic typology: studies in the phenomenology of language*. Austin, TX: University of Texas Press.

Lindstedt, Jouko. 2009. "Esperanto – an East European contact language?" In: *Die Europäizität der Slawia oder die Slawizität Europas. Ein Beitrag der kultur- und sprachrelativistischen Linguistik*, edited by Christian Voß and Alicja Nagórko, 125-134. München/Berlin: Otto Sagner.

Parkvall, Mikael. 2011. "How European is Esperanto?" *Language Problems & Language Planning* 34/1: 63-79.

Pennacchietti, Fabrizio A. 1982. "Ne-hindo-europaj trajtoj de la Internacia Lingvo." In: *Lingvo-kibernetiko/Sprachkybernetik*, edited by Helmar G. Frank Yashovardan & Brigitte Frank-Böhringer, 92-95. Tübingen: Gunter Narr Verlag.

Pennacchietti, Fabrizio A. 1987. "L'internazionalità dell'Esperanto e il carattere degli elementi indo-europei di esso." In: *La comunicazione internazionale tra politica e glottodidattica*, a cura di Andrea Chiti-Batelli, 130-139. Milano: Marzorati.

Pereltsvaig, Anya. 2017. "Esperanto linguistics." *Language Problems & Language Planning* 41/2: 168-191.

Philippe, Beinot. 1991. *Sprachwandel bei einer Plansprache am Beispiel des Esperanto*. Konstanz: Hartung-Gorre.

Piron, Claude. 1977. *Esperanto: ĉu eŭropa aŭ azia lingvo?* Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.

Sapir, Edward. 1921. *Language*. New York, NY: Harcourt Brace.

Shagal, Ksenia. 2019. *Participles*. Berlin/Boston, MA: De Gruyter.

Sleeman, Petra. 2017. "Participial Relative Clauses." In: *Oxford Research Encyclopedia of Linguistics*, edited by Mark Aronoff. Oxford: Oxford University Press. https://doi.org/10.1093/acrefore/9780199384655.013.185

Tambovtsev, Yuri. 2008. "Typological Proximity of Esperanto to the Classical Language Taxa of the Indo-European Family." *California Linguistic Notes* 33/1: 1-44.

Van Parijs, Philippe. 2011. *Linguistic Justice for Europe & for the World*. Oxford: Oxford University Press. https://doi.org/10.1093/acprof:osobl/9780199208876.001.0001

Vennemann, Theo. 1974. "Topics, subjects, and word order: From SXV to SVX via TVX." In: *Historical Linguistics*, edited by John Anderson and Charles Jones, vol. 2: 339-376. Amsterdam: North-Holland.

Wells, John C. 1988. *Lingvistikaj Aspektoj de Esperanto*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.

Emanuele Miola is an Associate Professor of Linguistics at the University of Bologna. His research focuses on dialectology and sociolinguistics of minority and minoritized language varieties spoken in northern Italy as well as on typology. Recently, he co-authored with Nicola Duberti and Mauro Tosco *A Grammar of Piedmontese* (Leiden: Brill, 2023).
He can be contacted at: emanuele.miola@unibo.it